

1 a Jaro

Aprilo 1911

1 a No.



Moderna Humoro

Monata ilustrita gazeto
por

Humoro, Ĝerco, Satiro kaj Arto
en

Esperanto

Abonprezo : M.-2.40. Sm.-120. Fr. 3.00.

Unu numero kostas 20Pf. 10Sd. 25Crs.



*La lunon ne ĝenas se la hundo
ĝin albojas.*

Redaktoro kaj Eldonanto: Fritz Stephan, Leipzig, Windmühlenweg 1 a.

„MODERNA HUMORO“


enhavas nur
originalajn artikolojn kaj
desegnaĵojn.

Kunlaborantoj kaj
desegnantoj.

estas ĉiam serĉataj.



Represo de artikoloj kaj desegnaĵoj
estas nur permesata, se oni aldonas la
kvar vortojn :
(EI „MODERNA HUMORO“-LEIPZIG.)



Dro L. L. Zamenhof,
la aŭtoro de Esperanto.

Jnter Esperantistoj.

A.: Kial nia kara majstro aspektas tiel felice?

B.: Ĉar li ĝojas pri la apero de „Moderna Humoro“.

La mondo sen Esperanto.

Originale verkis por „Moderna Humoro“ Carl Barthel.

Kiel la tago sen la suno,
Kaj la nokto sen la luno,
Kiel sen-lando la regnestro,
Aŭ la domo sen fenestro,
Kiel sen Dio la homaro,
Sen kreskaĵoj la arbaro,
Estas vere ĉiu lando,
Sen la lingvo Esperanto. —

Kiel Afriko sen nigrujoj,
Eĉ sen mono la monuoj,
Kiel monaĥo sen la fratoj,
Sen la kisoj geamatoj;
Kiel infero sen diablo,
Parlamento sen spektaklo,
Estas vere ĉiu lando,
Sen la lingvo Esperanto. —

Kiel la ĉielo sen la steloj
Sen flugiloj la anĝeloj;
Kiel sen akvo la riveroj,
Aŭ la vortoj sen literoj,
Kiel la floro sen odoro,
La pentraĵo sen koloro,
Estas vere ĉiu lando
Sen la bela Esperanto. —

Kiel la homo sen animo,
Sen beleco la virino;
Kiel ĝardeno sen la floroj,
Aŭ moneroj sen valoroj;
Kiel sen nazo la vizaĝo,
Kaj sen rimo la versaĵo;
Estas vere ĉiu lando,
Sen la bela Esperanto.

La stomako de la struto.

Kiel oni scias, la strutoj englutas, kun granda plezuro, malmolajn eĉ nedigesteblajn aĵojn. Antaŭ nelonge en zologia ĝardeno en la parko de Lyon (Francujo) mortis strutino, en kies stomako oni trovis interesan enhavon: hordeo-grenojn miksitajn kun herbo kaj silikoj, 3 argilajn pipojn, tranĉilon kun kupra tenilo, 25 diversformajn butonojn, multe da kupraj moneroj, pecojn da poŝhorloĝaj ĉenoj, 6 nuksojn, pecetojn da kratago kaj metalfadenon 10 cm longan. Bonan apetiton!


Alois Halamasek.



Bildo sen vortoj.

Infana opinio.

Kiam la dentkuracisto estis eltirinta denton de knabo, petis tiu ĉi pri ĝi. — „Volonte, malgranda viro,“ diris la dentkuracisto donante al la knabo la denton, „do pro kio vi volas ĝin havi?“ — „Mi portos ĝin domon“, respondis la knabo tre kontente, „kaj tie mi plenigos ĝin per sukero kaj mi rigardos“ — li diris tion kun ĝoja vizaĝo — „ĝin, kiam ĝi havas dentkolorojn!“ K. B.



La Viljo-Kanto.

Vivadas knabino en arbarego,
 Casisto ŝin vidas kun admirego.
 Ektuŝis potecne lian koron
 De kiam li ekvidis la belan floron.
 Kaj ne jam konata sento
 Ekprenas lin sammomente
 Kaj sopire li ekkantas:
 ∴ Viljo, ho Viljo, Dolĉa knabinet'
 Iĝu do mia kara edzinet'!
 Amu kaj kisu min sen fino
 Bela arbarknabino. ∴

Tradukis

Fritz Stephan.

Malica kritiko.

Vizitanto (en laborejo de moderna pentristo): „Hm, tiel espektas sunsubiro en tiu ĉi regiono!“

En la juĝejo.

Juĝisto: „Kian profesion vi havas?“

Atestanto. „Mi estas harartisto.“

Juĝisto: „Parolu pli klare: barbisto aŭ brosilfaristo?“

Zorgoj pri nutrado.

A.: „Ĉu vi scias pro kio la soldato Müller sin memmortigis?“

B.: „Jes, lia fianĉino, la kuiristino de D-ro Vogel, iĝis al li malfidela!“

A.: „Aha, la kaŭzo estis sekve zorgoj pri nutrado!“ M. L.

Admiro.

Sro B. jam delonge penadis profite rimarkebligi sin ĉe la nova oficejestro. Ĉiam li estis la unua en la oficejo, forlasis ĝin kiel lasta kaj sciante, ke la nova ĉefo kutime faris sian vesperan promenadon preter la oficeja domo, li eĉ vespere ankoraŭ iris en sian kontoron kaj ĉiam zorgis, ke la fenestro apud la strato ĉiam estis surprize heligita. Sed malgraŭ tio la sinjoro oficejestro tute ne ŝajnis rimarki la ofican fervoron de sia oficisto. Intage Sro B. en gastejo sidis apud sia estimata ĉefo kaj pli forte ekbatis lia koro, kiam tiu ĉi fine adresis ankaŭ al li kelkajn vortojn, eĉ frapis lin afable sur la sultron dirante: „Efektive, mia kara B., mi admiras vin, kiel vi . . .“ — „Hura!“ pensis la oficisto ĝojegite, — „kiel vi estas diligenta, diros la sinjoro estro“ — kaj jam vidis sin en pli alta ofico — jen daŭrigis la sinjoro ĉefo: „ . . . kiel vi ĉiam povas fumi tinjn ĉi fiegajn cigarojn sen vom!“ W. Sch.

Terura infano.

Patro volis klarigi al sia fileto la ruĝe signitajn tagojn sur la murkalendaro kaj lin demandis: „Ĉu vi scias, kara infano, kion signifas la ruĝe signitaj tagoj?“ „Jes, kara paĉjo, mi tion scias: ili signifas vian libertempon, kiam vi — laŭ la permeso de la patrino — povas iri gastejon kaj tie restadi ĝis la 10a vespere.“ . . . ek.

Demando.

A.: „Kio estas la edzeco?“

B.: „Ĝi estas malliberejo por korstelitoj.“ . . . ek.

Preparo. La malgranda Kaĉjo: „Ĉu vi hodiaŭ frumatene nenion rimarkis pri la termovo, paĉjo?“ — Patro: „Ĉu do okazis termovo?“ — Kaĉjo: „Jes, sendube, ĉar kiam mi staris apud la seĝo, subite la lavplado malsuprenfalis kaj disrompiĝis.“ Sch.

Post la provkantado.

Kantistino: „Mi ne scias, ĉu tio estis komplimento aŭ ne? La muzikbandestro diris al mi post la Filinenario, ke mi certe tre bone povus kuiri!“

P. Klarnner.



Fraŭlino: Cu daŭros ankoraŭ longtempe ĝis alvenos la vagonaro de Berlino?

Staciestro: Ne zorgu, fraŭlino, vi ja estas ankoraŭ juna!

En la lernejo,

Instruisto klarigis al la infanoj la sencon de la vorto „dezerto“. „Vi vidas, infanoj,“ li parolis, „dezerto estas granda regiono, sur kiu nenio kreskas — Müller, mi kredas, vi ne atentis!“ — „Do, sinjoro instruisto!“ — „Nu, ĉu vi scias, kio estas dezerto?“ — „Jes, sinjoro instruisto, dezerto estas regiono sur kiu nenio kreskas.“ — „Ĝuste, nun nomu al mi ekzemple dezerton!“ — „Via kapo, sinjoro instruisto!“

Kl.



Knabino: Se mi edziĝas mi ne volas havi infanojn!

Edukistino: Kial ne?

Knabino: Ho, ripensu do, se mi havus filinon kiu aspektus kiel vi . .

Kelkaj spritaĵoj.

Juĝisto: „Ne neu plu, kelkaj atestantoj vidis vin stelantan!“

Akuzito: „Eble, via Mosto, sed mi povus nomi al vi milon da personoj, kiuj ne vidis min!“

A. H.

Malkompreniĝo. Profesoro: „Sinjoro kandidato, viaj respondoj ne estas malgustaj sed iom neklaraj.“ **Studento:** Mian honorvorton, sinjoro profesoro, mi hodiaŭ ankoraŭ nenion trinkis!“

A. H.

Sinjoro vizitis monahinejon kaj petis vidi monaĥinon. Kiam si alvenis, li tuj kisis ŝin. La aliaj monaĥinoj, ofenditaj pro tio, postulis klarigon de li. La sinjoro kviete respondis: „Kial mi ne povus kisi ŝin, ĉar mia patrino estas la bopatrino de ŝia patrino.“

. . . k.

Ĉe la sindikataj pordistoj. „Mi neniam malpacigis kun la luantoj.“ „Ni petas vian adreson.“ „Mi estas pordisto de la mortintejo.“


. . . k.



Sur la strato.

Li: Ĉu vi netimas vin iri tute sole?

Ŝi: Ne, mi kunhavas mian ombron!



Diverseco de opinioj.

- A.: „Per kia malsano li mortis?“
 B.: „Per malgranda diverseco de opinioj!“
 A.: „Ha, per interbatado?“
 B.: „Ne!“
 A.: „Tion mi ne komprenas.“
 B.: „La kuracistoj havis diversajn opiniojn kaj nia malfeliĉa amiko mortis, antaŭ ol ili unuigis.“

Invito.

La pentristo Riĥardson amis rakonti pri honesta sincera riĉulo, kiu iutage lin invitis viziti lin en lia domo kaj fine diris: „Mi tre deziras vian viziton, ĉar mi jus aĉetis tre karan pentraĵon de Rubens. Estas pentraĵo de malofta beleco. Se iu riskus diri, ke ĝi estas kopio, al tiu mi tuj disrompos ĉiujn ostojn! Bonvolu viziti min baldaŭ kaj diru al mi malkaŝe vian opinion!“

Edzo antaŭlegis al sia edzino ĉapitron el la Biblio, en kiu estas dirite, ke la saĝa reĝo Salomono havis 300 edzinojn kaj 700 aliajn virinojn. „Karulo mia“ ridetante la edzino diris: „Vi estus sentaŭga Salomono.“
H.

Medicina konsilo. Sinjoro: „Kion vi faris, doktoro, kiam vi malvarmumis?“ Kuracisto: „Mi tuisis, kara amiko!“
H.

Filo: „Paĉjo, kio estas pli flua ol flua?“

Patro: „La bopatrino, ĉar ŝi estas superflua.“

A. H.

En la knabina lernejo. Instruistino: „Kio estas la plej granda fiero de brava soldato?“ Knabino: „Lia kuiristino.“

A. H.

Strange estas! Profesoro, falante malsupren de kruta krutaĵo: „Strange estas, ke mi ĵus ne havas ĉe mi mian rapidecomezurilon!“

A. H.

Trograndigo. A.: „Mi sciigis ke vi estas trosarĝita per multaj laboroj.“ B.: „Jes, jes; mi laboregas tage kaj nokte. Fakte, mi tiun ĉi tutan monaton ne trovis tempon por min lavi, por ŝanĝi mian ĉemizon kaj por uzi la necesojn!“

A. H.

* * *

Moderna.

„Kiel estas via fraŭlino fianĉino?“

„Ho, ŝi estas ornamita per ĉiu komforto de la nuntempo!“

-er.

* * *

La gardo.

Sinjoro (nokte sur la strato): „Kion vi faras dum tiu ĉi malfrua tempo ankoraŭ sur la strato?“

Infanoj: „Nia patrino subite malsaniĝis.“

Sinjoro: „Aha, vi tial volas aĉeti medicinon por ŝi?“

Infanoj: „Ne, sed bieron . . . nia patro devas gardi ĉe si dum tiu ĉi nokto!“

-er.

* * *

El la „a Taggazeto.“

„En la aĝo de 98 jaroj mortis hieraŭ vespere la privatulo N., kiu estis la plej maljuna viro de nia urbeto, post mallonga malsano. Ne sole la multenombraj amikoj de S^{ro} N., sed ankaŭ nia tuta loĝantaro tre bedaŭras, ke ni nun en nia urbeto ne plu havas plej maljunan viron.“

Fr. St.

Persekuto kaŭze la religio.

La malgranda Morico venas al la lernejdirektoro: „Sinjoro Direktoro, oni persekutas min pro mia religio.“ „Nu, kion oni diras?“ — Morico ne tuj respondas, sed post refoja demando li ploregante diras: „Oni diras: Ho kian nazon havas Morico?“ St.

Nur unu parolon!

Du junulinoj persekutantaj tre amatan aktoron: „Ho, sinjoro Albino, nur unu parolon, nur unu parolon!“

Aktoro: „Anseroj!“

St.

Terura infano.

Onklo: „Vi estas tre bona, malgranda knabino, ke vi instigas min manĝi ankoraŭ teleron da supo! Kial vi volas tion?“

Nevino: „Por ke vi ne manĝu tiel multe de la kokinstrotaĵo, kiel la lastan fojon!“

St.

*Pri pasinta tempo.*

*Karesojn dolĉajn mi forgesis,
Ĝkdormis ama la fervor',
Ne logas min la ĝojo nova,
Ne bolas plu la sang' en kor'.
Kaj ŝarĝo premas la animon,
Turmentas min la rememor'
Pri tempo longe jam pasinta,
Ĉar kred' kaj amo estas for.*

*Simile vent' someran belon
Aŭtune ŝiras de tili'
Kaj sur vojetoj de l' ĝardeno
Foliojn sekajn portas ĝi.
Disiĝos unu de l' alia,
Flirtante dise en l' aer',
Kaj neĝo baldaŭ kovros ilin
Por morta dormo sur la ter'.
Karol Siewengłowski.*

Niaj infanoj.

Ella: La gimnazianon Blase mi tuj povus edziĝi!

Bella: Kion, tiun ĉi malbelegan homon?

Ella: Jes. Li estas tre miopa kaj sekve ne povus vidi, se mi flirtus kun aliaj!

La ĉagrenanto.

A.: „La tutan tagon vi hodiaŭ sidas en la trinkejo!“

B.: „Mi volas trankviligi mian ĉagrenon; — mia fianĉino resendis al mi mian ringon.“

A.: „Tion ŝi do jam faris antaŭ du semajnoj!“

B.: „Jes, sed mi nur hieraŭ ricevis monon!“

D. R.

* * *



Kelnero de vinrestoracio: Ĉu vi kunhavas ion por mia ĉeto?
Leterportisto: Jes, fakturon de lia akvoliveranto.

* * *

Reciproke.

„Karulo“ ŝi parolis, kiam ili sidis sur la lunbrilata benko la unuan tagon post sia geedziĝo, „mi devas malkaŝi al vi sekreton!“

„Kion?“ li respondis kolere.

„Ĉu vi povas pardoni al mi, ke mi trompis vin? Mia dekstra okulo estas el vitro.“

„Ho,“ li respondis, „trankviliĝu, la diamantoj de la ringoj, kiujn mi donacis al vi, ankaŭ!“

F. St.

La tri honestaj virinoj de la mondo.

Inter la korteganoj de la granda reĝino Elizabeto de Anglujo la markizo Greenville distingis sin per sia ĉiam preta sprito. Ĉe la reĝino ne malakceptis sin amuzigi per liaj kapricaj ekpensoj kaj akraj respondoj. Iam ŝi demandis la sercemulon, kion li pensas pri la virinoj. „Ne multe da bono“, respondis Greenville, „ĉar ekzistas nur tri honestaj virinoj en la tuta mondo!“ Ĉiuj kortegsinjorinoj paliĝis pro timo, ke la klarokula ruzulo povus ofendi la facile ofendeblan Elizabeton. „Kiu estas tiuj ĉi tri esceptoj de la malbona regulo?“ demandis Elizabeto. Greenville respondis „Via Mosto estas la unua, mia propra edzino estas la dua kaj — — —“, atendplene ĉiuj okuloj direktis sin al liaj lipoj, — — „kaj — —“ daŭrigis Greenville post longa paŭzo, — „nomi la trian estus tre malsaĝa, ĉar tiel ĉiu de viaj sinjorinoj povas opini, ke ŝi mem estas la tria.“

Wilhelm Scholz.

Terura telegramo.

En Berlino iam estis aranĝita granda sinoda kunveno de la protestanta pastraro. Ankaŭ la pastro St. forlasis sian hejman urbeton por partopreni la solenajn kunsidojn. Envoje dum la longa fervojveturado tra neinteresaj kaj eniujaj regionoj li subite ekmemoras pri la malnova kaj multloke difektita kadro de la bela altarpentraĵo en sia hejma preĝejo kaj li ekpensas, ke li en la granda urbo facile povus aĉeti novan kadron. Tial alveninte en Berlino, li tuj skribis al sia edzino, ke ŝi informu lin pri la longeco kaj larĝeco de la bildo kaj pri la frazo, kiu estis engravurita en la kadron kiel subskribaĵo. Post la kunsido la pastroj refreŝigis sin en gaja rondo trinkante kaj sercante — jen envenis postoficisto kaj transdonis telegramon al la pastro St. Tiu ĉi, jam delonge estante forgesinta la altarbildon kaj sian leteron, hezite kaj timplene malfermis la paperon kaj — malantaŭen falis pro teruro. Ankaŭ la ĉeestantoj rigardis senparole la telegramon, ĉar tiu ĉi enhavis la jenan surprizan sciigon:

Hodiaŭ filo al ni estas naskita, tri metrojn longa kaj du metrojn larĝa. Gertrudo.

W. Sch.

Filo: „Paĉjo, por kio oni do bezonas glacisaketon?“

Vilaĝa restoraciisto: „Versajne oni ĝin metas sur la stomakon, kiam oni trinkis tro varman bieron.“


W. Sch.

La diferenco. Kampano, demandite, kiu estas la diferenco inter kuracisto kaj advokato, respondis: „Ĉe la unua niaj okuloj fermiĝas, ĉe la dua ili malfermiĝas.“

— z.

Pentristo havis la taskon pentri la malbonan konsciencon. Li pentris ĉevalon kuregantan kaj sekvatan de vespoj kaj abeloj kun la latina subskribo: Frustra curis, t. e. Esperante: Vi kuras vane.

... 1. ...



Senhonta homo.

Mary: Sro Webb, nia nova instruisto por geografia kaj historio estas senhonta homo, ĉar li jam kvarfoje kisis Paŭlinon kaj mi ne eĉ unu fojon:
Ed. Knox.

* * *

En la ferioj.

I.

Johanino aŭdas en la lernejo ke Dio estas ĉie, do precipe en la preĝejo. En la ferioj ŝi ĵus ludas antaŭ la domo de sia onklino, kiam ŝi subite vidas kiel cikonio revenas al sia nesto sur la preĝejoturo. Rapide ŝi kuras al sia onklino por diri al ŝi: „Oklinjo, al la kara Dio ĵus venis la cikonio!“

II.

Feriohavanto (al la vilaĝano, ĉe kiu li loĝas): „Sinjoro Huber, la kuracisto rekomendis al mi haki ĉiun tagon amason da ligno. Ĉu vi do permesas, ke mi dishakas tiun faligitan arbon?“


Vilaĝano: Nature, per tio mi ŝparas laboriston!

... Sed unu Markon vi devas pli pagi po tago!“

Feriohavanto: „Ĉu vi estas freneza. Por tio, ke mi laboras por vi?“

Vilaĝano: „Ne, sed pro via pli granda apetito!“

K. B.



Inter kolegoj.

Prof. A.: Ĉu vi ĉeestos la enterigon de nia amiko Franco?
 Prof. B.: Ne, tiu ja ankaŭ ne ĉeestos mian enterigon!

El romano.

„Dum la hundo kaj lia stomako murmuris, la pordo kaj liaj botoj kraketis, la papageno kaj lia bopatrino kriegis, subiris la suno!“

F. St.

El alia romano.

Ŝi kuris tra la ĉambro kun flugantaj nazflankoj, puse spirante Ŝi premis la manojn sur la plenan bruston kaj jetis ilin en la plej proksima momento flanken!“

F. St.

Moderiga motivo.

Juĝisto: „Kulpigito, ĉu vi volas ankoraŭ fari iun ajn rimarkon?“ Akuzito: „Ho, nur unu vorteton, sinjoro!“ Juĝisto: „Parolu!“ Akuzito: „Sinjoro juĝisto, mi esperas ke vi estos malsevera kontraŭ mi; estas ja hodiaŭ la deka fojo de kiam mi havas la grandan honoron esti juĝata de vi!“

A. H.

A.: „Kion faras via filo?“ B.: „Li forveturis Parizon kun lignaj ŝuoj kaj nun li havas veturilojn.“ A.: „Ĉu vere?“ B.: Jes, li estas veturilfaristo.“

Alois H.

Infanaj paroloj.

*La malgranda Ernesto venas el la lerneoj kaj rakontas:
„Aŭskultu, patro, en mia klaso estas knabo, kies patro jam-
antaŭ dudek jaroj mortis!“*

Aha-aha!

A.: „Mia amiko, vi estas azeno!“

B.: „Permesu al mi demandon: „Ĉu mi estas azeno, ĉar mi estas via amiko, aŭ ĉu mi estas via amiko, ĉar mi estas azeno?“

K . . . er.



Fraŭlino: „Ĉu vi ofte vizitas la universitaton?“

Studento: „Ne, nur se mi ne havas monon por hejtigi mian ĉambron.“



UNIVERSO.

Internacia klubo de kolektantoj de
ilustritaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj.

Ĉiu povas iĝi membro, kiu promesas
sole korespondi en Esperanto. La jara
kotizo estas M. 2.40, (3 Frankoj, 2¹/₂
ŝilingoj), por kiu ĉiu membro ricevas
senpage la klubgazeton „La Esperantisto“
kaj la membroliston.

Eniru multenombre, Esperantistoj, kaj
flegu la belan vidaĵkartsporton en via
propra intereso kaj por la bono de nia
Esperanto. Novajn aliĝojn kaj la jaran
kotizon oni sendu al la sekretario Sro.
Fritz Stephan en Leipzig, Windmühlen-
weg 1a; la eniro povas en ĉiu monato
okazi, enskribmono ne estas postulata.



Moderna Esperanto-Biblioteko
Ĉiumonate aperas 32 paĝa kajero po
- 20 Pfg., 25 Cts. 0.10 Sm.
Ĝis nun aperis:
Nr. 1. Moderna Humoro I.
„ 2. La kruro, novelolaŭ Zschok-
ke tradukita de L. Irmischer.
„ 3. Moderna Humoro II.
„ 4. Post 25 jaroj kaj aliaj noveloj.
Kontraŭ alsendo de la sumo
afrankite de la eldonanto
Fr. Stephan, Leipzig, Windmühlenweg 1a.

**Jedem Esperantofreund sind
zu empfehlen:**

Esperanto-Taschenkalender für 1911	M. —.60
Esperanto-Siegelmarken, 100 Stück	„ —.40
Ansichtskarten m. Esperantotext 25 sort.	„ 1.—
„La Esperantisto 1910“ komplett	„ 1.20
„La Esperantisto 1909“ (10 Nr.)	„ 1.—
Esperanto-Taschenkalender 1910	„ —.45

Gegen Voreinsendung des Betrages portofrei
zu beziehen vom Verlag

Fritz Stephan, Leipzig.
Windmühlenweg 1a.

La plej interesa gazeto estas

„La Esperantisto“

Internacia monata gazeto por
Politiko, Scienco, Literaturo, Arto, Sporto,
Komerco kaj Humoro en
ESPERANTO

Eliranta jam la trian jaron ĉiumonate
en 16 paĝa

Ilustrita kaj bele bindita numero.
Jara abonprezo: 2 — M., 2.5 l s., 2 — Ŝil.
1,— Rub. 1.— Sm.

Postulu tuj kontraŭ respondkupono
provnumeron de S-ro **Fritz Stephan,**
Leipzig, Germ. Windmühlenweg 1a.

— Esperantisten! —

verwendet für eure Korrespondenz nur Ansichtskarten mit Esperanto-Text.
1 Dutzend (sortiert) M. —.50.

Neu! Neu! Neu!

Galerio de konataj Esperantistoj

(Galerie bekannter Esperantisten.)

Künstlerisch ausgeführte Ansichtskarten mit den Portraits bekannter Esperantisten. Bisher erschienen Karten mit den Bildern von Zamenhof, Stephan, Irmischer, Scholz, Butin, Barthel, Ebertin, Raschdorf, Nottbrock, Andrae, Dr. Koch usw. (Die Serie wird fortgesetzt, pro Monat erscheinen 4 neue Karten.)

Preis pro Karte M. —.05, 12 Karten M. —.50.
Gegen Voreinsendung des Betrages portofrei zu beziehen von

Fritz Stephan, Leipzig,
Windmühlenweg 1a.

Ĉiu Esperantisto devas
regule legi

ESPERANTO

Duonmonata internacia gazeto.
Direktoro: H. Hodler.

Tutmonda informilo.

Ĉiulandaj korespondantoj.

Socia vivo — Komerco — Geo-
grafio — Ideoj kaj faktoj — Kon-
greso kaj festoj — Aerveturado
— Esperantistaj manifestacioj —
Diversaj statistikoj — Esperanto —
Rubrikoj per korespondado, petoj
kaj proponoj.

**Oficiala organo de Universala
Esperanto — Asocio (U E. A.)**

„Esperanto aperas la 5 an kaj
20 an de ĉiu monato.

Jara abono: simpla eldono Sm 2.—
luksa eldono (sur pli bona papero) Sm
2.50. **Oni akceptas nur tutjarajn abo-
nojn.** Direkcio: 10 rue de la Bourse 10,
Genève (Solcujo). Specimeno senpage
laŭ peto!

Die Anhänger des Esperanto lesen mit besonderer Vorliebe die monatlich in schön gehäuftem Großquartformat von mindestens 16 Seiten pro Nr. erscheinende Zeitschrift

„**LA ESPERANTISTO**“ die infolge ihrer fast einzig dastehenden Verbreitung über alle Erdteile wohl das beste Bindemittel zwischen den Esperantisten aller Länder bildet.

„**LA ESPERANTISTO**“ ist das offizielle Organ des „Verbandes Deutscher Esperantisten“ (Sitz Leipzig), des internationalen Esperantisten-Korrespondenzklubs Universo (Sitz München), der „Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj“ (Sitz Dresden), und von vielen anderen Esperantisten-Gruppen, Gesellschaften usw.

„**LA ESPERANTISTO**“ ist für Deutsche, die mit dem Studium des Esperanto erst beginnen wollen, oder bereits begonnen haben, besonders zu empfehlen, weil „**LA ESPERANTISTO**“ in jeder Nummer interessante Übungs- und Fortbildungsbriefe f. Deutschsprechende bringt, und aus diesem Grunde von zahlreichen deutschen Esperantovereinen als Unterrichts- und Fortbildungsmittel benutzt wird.

„**LA ESPERANTISTO**“ enthält in jeder Nummer besondere Rubriken mit den Titeln:

„Poŝta Esperantisto“;
„Polica Esperantisto“;
„La Kolektanta Esperantisto“;
„La Kroniko de Esperanto“.

Abonnement pro Jahr (12 Nrn.) M. 2.—.

Zu beziehen vom Herausgeber:

Fritz Stephan, Leipzig,
Windmühlenweg 1a.

VERDA STELO,

monata oficiala organo de C. M. E.
Redakcio, I.^a Aduana Vieja, n.^o 4;
adreso: apartado 2759, Mexico,
D. F. Jare: Doll I (Sm. 2).

Lachend

und spielend zugleich lernen Sie die immer fühlbarer zur Einführung gelangende

Weltsprache ESPERANTO

durch Lesen der Zeitschrift

Moderna Humoro.

Monatlich erscheinende, reich illustrierte
20 seitige Zeitschrift für

**Humor, Scherz, Satyre u. Kunst
in Esperanto.**

Abonnementspreis pro Jahr M. 2.40 bei
portofreier Lieferung Mitte jeden Monates.

Probe-Nr. gegen Einsen-
dung von 20 Pfennig. .:

Zu beziehen vom Herausgeber:

Redakteur Fritz Stephan, Leipzig,
Windmühlenweg 1a.

The British Esperantist

Oficiala organo de

Brita Esperantista Asocio

MONATA

Museum Station Buildings:

133-6 High Holborn, London W. C.

Jara abona Sm. 1,50.

La ondo de Esperanto

26 Tverskaja, Moskvo, Rusujo.

Jara abonpage (1.20 Sm.).

Dum la 3a jaro de sia ekzistado tiu ĉi ĉiumonata regule perioda organo de Rusaj Esperantistoj donas senpage al siaj abonantoj, krom 12 16-pagoj numeroj, la librojn:

1) A. Rivier en Rusujo per Esperanto (130 paĝa). 2) V. Devjatnin. Plena Verkaro. 3 — a vol. 140 — paĝa libra.

Notwendigste Bücher zur gründlichen Erlernung der Weltsprache

Esperanto

(zum Selbstunterricht)

Vollständ. Lehrbuch des Esperanto mit Uebungen und Schlüssel, 11. Tausend	M. 0.50
Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch	M. 0.75
4. Tausend	
Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto	M. 0.75
4. Tausend	
Uebungsbuch des Esperanto	M. 0.80
3. Tausend	
Fortbildungsbuch des Esperanto	M. 0.60
1. Tausend	
Konversationsbuch des Esperanto	M. 0.80
3. Tausend	
Private und Handels-Korrespondenz in Esperanto	M. 1.—
2. Tausend	
Die Weltsprache Esperanto und ihre Bedeutung für Wissenschaft, Handel und Verkehr. Ein aufklärender Vortrag, den jeder Anhänger des Esperanto lesen müßte. 10. Tausend	M. 0.10

Esperanto-Literatur:

Toni. Drama nach Theodor Körner in Esperanto	M. 1.—
Anekdotlibro	M. 1.—

La Evangelio de Sankta Mateo
(das Matthäusevangelium in Esperanto) M. 0.50

Die vorstehenden Bücher sind gegen Einsendung des Betrages, portofrei zu beziehen von

Fritz Stephan, Leipzig,

Windmühlenweg 1a.

Responda redaktoro kaj eldonanto: Fr. Stephan, Leipzig, Windmühlenweg 1a. Presejo: O. Wendt, Leipzig.